

36-a jaro. N. 86. 2a semestro 2010.



# VENEZUELA STELO

Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



**Nia Zamenhofa Vespero 2010**

**La 27-a Internacia Festivalo en Nördlingen**

**La insulo de Nemo (VII) kaj  
Mi bedaŭras la tempon perditan (II)**

**La 6-a AZIA KONGRESO DE ESPERANTO**





# Enhavo

**Naciaj Novaĵoj** paĝo 3-a**LA INSULO DE NEMO (VII)**

Johano Negrete paĝo 4-a

**La misfortuna horo (IIa Parto)**

Ricardo Coutinho paĝo 7-a

**La 6-a AZIA KONGRESO DE ESPERANTO**

Liba Gabalda paĝo 8-a

**Mi bedaŭras la tempon perditan sen Esperanto**

Johano Negrete paĝo 10-a (Dua Parto)

**La 27-a INTERNACIA FESTIVALO EN NÖRDLINGEN**

Liba Gabalda paĝo 12-a

**Kio eblas en Esperanto? Aŭ laŭ Ken Miner:  
Esperanto: la svaga lingvo!**

Ramo Moraloj-Kastelo paĝo 14-a

**Debutas novaj E-filmetoj** paĝo lasta

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭlegaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligis al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

**VENEZUELA STELO**  
Organo de la Venezuela Esperanto-AsocioAsociación Venezolana de Esperanto  
Venezuela Esperanto-Asocio

**VENEZUELA STELO**  
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A  
telefonnumero 58-0212.662.9224  
[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)  
[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)

**Redakcia Komisiono:**  
Johano Negrete, Esteban Emilio Mosonyi  
kaj Ricardo Coutinho.

**Grafikisto:** Ramón Morales Castel.  
(Ramo Moraloj-Kastelo).

**Estraranoj:**

**Prezidanto:** Johano Negrete.  
**Vic-Prezidanto:** Juan Miranda.  
**Sekretario:** Ricardo Coutinho.  
**Kasistino:** Elizabeth Miranda.

**Aldelegitoj:**  
Esteban Mosonyi  
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).  
Nancy Aquino (Eldonado).  
Aquiles Rivas (Biblioteko).  
Silvana Messori (Instruado).

**Kunlaborantoj:**  
Liba Gabalda.  
Ramo Moraloj-Kastelo.





# Naciaj Novaĵoj

## Prelego “Pri Lingvo, Retoriko kaj Logiko”

La profesoro Johano Negrete faris resumon historian pri la retoriko kaj la logiko, parolis pri la libro *Retoriko* de Ivo Lapena, la unua verko pri la temo en nia lingvo. Ĝi okazis en la landa asocio. Januaro 2010.

## Radio-programo “Crónicas Mundanas”

La ĵurnalisto Libeslay Bermúdez intervjuis al Johano Negrete kaj Ricardo Coutinho en sia radio-programo “Crónicas Mundanas”. Estis pritraktitaj: Kio estas Esperanto?, historia resumo pri Esperanto, la movado, persekutoj al nia internacia lingvo kaj pri la eldono de la libro *Eta selektaĵo de Verkoj de Simón Bolívar*. Ĝi okazis en Februaro 2010.

## Prelego pri Esperanto

Nia prezidanto Johano Negrete parolis pri Esperanto en la Lernejo de Mordernaj Lingvoj en la Centra Universitato de Venezuelo. Ĝi rilatas al la evento *Unu horo, unu Lingvo* kiun faras tiu lernejo ĉiujare. Partoprenis 15 lernantoj, kiuj faris multajn interesajn demandojn. Ĝi okazis je 17a de Majo 2010.

## Universala Kongreso kaj Junulara Kongreso

Ricardo Coutinho estis reprezentis nian landon en la UK kaj JK okazintaj en Kubo. Ambaŭ eventoj estis plenumitaj de internaciaj kaj folkloraj diversecoj; famiĝis la muzikgrupo *Amindaj*. Per tre grava helpo de TEJO, Amerika Komisiono kaj Kuba Esperanto-Asocio oni povis partopreni. Dankon al la tre bela kaj afabla kuba popolo. Ĝi okazis en fino de Julio ĝis komenco de Aŭgusto.

## Ateliero pri Doña Bárbara

Danke al la profesorino Maria Teresa Arenas okazis ateliero en la legoĉambro *Maelström*. En ĝi la profesoroj Johano Negrete kaj Esteban Mosonyi parolis pri la verko *Doña Bárbara* de Rómulo Gallegos kaj tradukita de Fernando de Diego, krome, parolis pri kelkaj aliaj gravaj tradukoj al esperanto kaj la avantaĝo de la lingvo Esperanto kiel internacia literatura lingvo. Ĝi estis parto de programo de la Lernejo de Mordernaj Lingvoj de la Centra Universitato de Venezuelo, la celo de tiu evento estas promocii la legadon de gravaj kaj internaciaj verkoj, okazis je 26a de Oktobro 2010.

## Ateliero *Esperanto: Lingvo kiu proksimigas la lingvojn kaj kulturojn*

Okazis ateliero pri Esperanto en la Lernejo de Mordernaj Lingvoj de la Centra Universitato de Venezuelo. La profesoro Johano Negrete parolis pri la movado kaj avantaĝoj de la lingvo, la profesoro Esteban Mosonyi instruis la lingvon kaj Ricardo Coutinho parolis pri la literatura diverseco kaj montris librojn kaj revuojn al la partoprenantoj. Ĝi estis ateliero de du tagoj kaj okazis je 25a kaj 26a de oktobro 2010.

## Zamenhofa Vespero

En Karakaso, je la 15a de Decembro 2010 okazis la Zamenhofa Vespero en la restoracio “La Casita del Ají Dulce”. Partoprenis la estraro de la Venezuela Esperanto-Asocio kaj kelkaj invititoj kiel du komencantoj, nia asociano Ramón Morales venis el Maturín kaj la prezidanto de entreprenanto de la Lingva Instituto Stern. La naskiĝofesto de Zamenhof kromas vespermanĝo, deklamacio de la profesoro Esteban Mosonyi pri João Pessoa en la hispana, portugala kaj esperanta kaj senmanko kelkaj varmaj vortoj de nia prezidanto Johano Negrete.

## Kursoj

La profesoro Johano Negrete ĉiusemetre malfermis kursojn de Esperanto en la Lernejo de Filozofio de la Centra Universitato de Venezuelo. Dum la unua semestro 2010 en la Kurso unua nivelo, partoprenis 7 lernantoj kaj sukcesis 6. Kaj dum la dua semestro 2010 en la Kurso unua nivelo partoprenis 12 lernantoj kaj sukcesis 11. En Februaro 2011 malfermos du niveloj de Esperanto.

Elementa Kurso de Esperanto en nia asocio komencis je la unuaj tagoj de novembro 2010, partoprenis du lernantoj kaj instruas Ricardo Coutinho.

## Asembleo 2010

Je la 29a de januaro 2011 okazis la Ordinara Asembleo rilata al la administra periodo novembro 2009 ĝis novembro 2010. Laŭ la tag-ordo la Sekretario Ricardo Coutinho montris la agad-informilon kaj la plan-agadon, la kasistino Elizabeth de Miranda prezentis la financajn informilojn. Sekve la Asembleo decidis ke la kotizoj devus esti: Membro Aktiva 300 bolivaroj, Amika Membro 150 bolivaroj, la membroj aktivaj kiuj loĝas en Karakaso devus pagi krome monatan kvoton de 50 bolivaroj por subteni la elspezojn de la oficejo.





# LA INSULO DE NEMO (VII)

Johano Negrete

Ekzistas kelkaj faktoj aŭ momentoj, kiuj tiom eksterordinaras en la homa vivo, ke kvankam oni plenigas ofte la menson kaj koron kun multaj aliaj eventoj tutplenaj de koloroj kaj produktivo, de gajo kaj bonaj konsekvencoj, de sato kaj fiero pro kio oni povus senti la feliĉon de memplenado, tamen la magio de kelkaj vivmomentoj, ŝajne sen graveco, superas ĉion alian, kaj aperas sur la vivhorizonto kvazaŭ frumatena roseto. Roseto, kiu refreŝigas la unuajn minutojn de ĉiu tago, apenaŭ oni eliras el la dormo kaj malfermas la okulojn por alfronti la lumradiojn de la reala mondo.

Tiaokaze la homo rezistas la ellitiĝon, ĉar deziras pasigi kelkajn minutojn pli revante ekde la fundo de nia konscio pri tiuj magiaj momentoj, floroj de pasintaj travivaĵoj, amoraĵoj, enamiĝoj, sekso kaj tenero, aŭ perditaj okazaĵoj, kies nura ekzistado estas tia, kia gardita memorbildo, kiun ni poste ornamas per homa fantazio.

Pro tio ni ofte bedaŭras komenci la tagojn sen estigi la propran imagon de nia vivo, ĉar oni ne volas forlasi nek lasi nutri tiujn nostalgiajn rememorojn, kiuj dolĉe karesegas la animon, samkiel venteto freŝa antaŭ la unuaj ĉiutagaj taskoj. Tial inter sonĝo kaj maldormo matenete reaperas niaj kvazaŭrealaj bildoj, kiuj instigas la intiman koncentradon, kiam ni fuĝas al nia propra interna mondo de libero kaj soleco. Oni povus pensi, ke tiaj bezonoj kaj memoraĵoj estas la sumo de nia ekzistado, nia propra efemera bilanco de feliĉo aŭ malfeliĉo, kondiĉe ke krom tiuj dolĉaj rememoroj la bilanco ankaŭ entenu konscienc-riproĉojn.

Tiel Munja kaj Nemo vivas tiaspecajn momentojn kiel depono en estonta konto de la konscienco por ĉiam rememori la vivitaĵojn, kiam inter maro, ĉielo kaj suno ambaŭ veturis per la boato de Laŭtaro al la kajeo proksima de Varadero. Rompinte la duelon de rigardoj de niaj du amsopirantoj, la boatisto anoncis la foran videblan bordon de la kajeo, meze kronita el kokospalmoj. La boato moviĝis rapide, sed jam alproksimiĝinte al la plaĝo ĝia motoro silentiĝis kaj lante daŭrigis por albordiĝi lignokajeton, iomete kuŝita inter la vegetaĵaro.

Kiam ĉiuj elboatiĝis kaj la geamantoj piediris sur padeton por atingi la longan plaĝon, Munja ne povis moderigi sian miron. —Kia belega plaĝo! —ŝi krietis— Ĉi insuleto havas la plej mirindan sablon kaj trankvilajn marondojn, kiel mi neniam vidis! Kaj sekve ŝi ŝajnis per la brilo de siaj bluj okuloj inviti lin ekkuri al la ŝaŭmo de la bordo.

—Vere bele, Munja! Tamen Varadero ne estas insuleto, kvankam ĝi ŝajnas tia. Ĝi estas duoninsuleto. Belega terpinto invandinta la maron! Mirindaĵo de nia lando! Kaj mirindaĵo, ke mi estas ĉi tie kun vi, kara, en tiu fajna sablo. Ni povas naĝi kaj piediri longe tra la maro.

La ĉielo sennube. La varmo kreskis tiuhore. Tridek ses gradojn centigradojn kaj ĝi povus altiĝi je la posttagmezo. En Varadero estis malmultaj vizitantoj, ĉar la vojaĝo estas pli longa. Niaj geamantoj alproksimiĝis al la marbordo kaj komencis prepariĝi por la bano.

—Diable, ne eltenebla varmo! Venu al l' akvo rapide, Munja! Miaj piedoj jam bruletas! — diris Nemo kurante, sen alia rifuĝejo ol eniri la maron.

Certe, Varadero estis la plej belega plaĝo pro ĝia ora kaj nekomparebla fajna sablo, kaj speciale dezirebla pro la trankvila kaj dolĉa sinsekvo de marondoj kutime senventa; tamen, kontraste kun aliaj kajeoj, ĉemarborde ne estas arboj nek palmoj sed iomete distaj. Do banantoj devas alporti tendojn aŭ sunŝirmilojn, ĉar la plaĝo mem entenas neniun konstruaĵon nek rifuĝejon kaj la forta suno elpremas la haŭton.

La geparo eniris tiun plezuregan maron kun softa sablo. Dolĉaj minutoj pasis en la travideblaj akvoj dum ili ludis kaj brakumis reciproke, submerĝis kaj plaŭdis sur la pacaj ondoj, aŭ flosis samkiel krucumuloj aŭ kaŝis ekscitantaj karesojn subakve. Tiele la vivo ŝvebis kiel birdo, kies korpo senlaciĝas aere. Samtiel vivis iliaj korpoj kvazaŭ se ili ne apartenus al la solida parto de la tero, ĉar vojaĝis en alian dimension.

Intertempe Laŭtaro restis atendante apud la boato jam kun iom da malpacienco, ĉar la tempo flugas kaj mankas alia veturado. Tamen Nemo kaj Munja ne rapidis en sia banado. Ili aspektis ne memori la ceteran planon, kaj dum li subtenis ŝin sur liaj brakoj en la akvo kaj ŝi ĉirkaŭis per siaj brakoj la kolon de Nemo, ŝi profitis rigardi lin fikse, naive, penetrante en liajn okulojn, kiel dezirante bori la misteran verdaĵon de la amanto, kiu malkovras liajn pensojn. Subite ŝi flustris en lia orelo:

—Ĉiam mi aŭdis, ke verdaj okuloj estas trompeblaj, malfidelaj, ĉar Ili kaŝas ĝiajn pensojn. Male, la mallumaj okuloj estas pli travideblaj kaj pro tio malpli trompeblaj; kvankam pri viroj oni neniam scias.

Li ridetis tian superstiĉon, kiu, laŭ kutimo de Munja, ofte konkludis je sindikata sinteno fronte al la viroj.

—Viaj bluj okuloj ankaŭ estas helaj, Munja, kio donas al mi la ŝancon egalpensi pri vi. Ĉar en mia lando oni diras samtiel, sed ĝenerale pri helaj okuloj. Ne forgesu tion, kara. Tamen, la tiom belaj viaj estas "ĉielbluj", kaj tio signifas —Nemo enfazis— "pli proksime al la palaco de Dio". Ĉu ne? Do, ili ne povas trompi.

—Ĉu vere vialande la aserto estas aplikata al "helaj okuloj"? Kiel stranga via lando! Mi nur aŭdis pri "verdaj okuloj". Tamen mi scias almenaŭ, ke miaj ĉielbluj ĉiam perfidas min. Kiam mi volas plori ne povas, kaj ploras kiam ne deziras. Nun mi volas kaj ne povas.

Kaj kial plori nun ĉi-momente? Pro feliĉo aŭ malfeliĉo?





## LA INSULO DE NEMO (VI) Johano Negrete

Nemo kaptis en la vizaĝo de Munja evolueton, kiu indikis, ke ene de ŝi kreskiĝis internaj kontraŭdiroj aŭ dilemo, ĉar ŝi eligis respondon kun iom da ŝanceliĝo, kiam ŝi aldonis la jenon:

—Ŝajnas al mi, ke jam ĉiu tago estas malpli longa kaj eble kaŭze de la proksimeco de nia disiro. Kion vi faros kiam mi revenu mialanden? — demandis ŝi kun impeta kuriozaĵo kaj duonmoke aldonis por montri sinregon— Ĉu sinjoro Nemo restus en la urbego kun lia familio aŭ ĉu li vojaĝus al Eŭropo.

—Bonvolu ne parolu ankoraŭ pri tio, kara. Ni vivu unue ĉi tiun ekskursotagon. Poste mi ne scios. —Dirante tion, li lasis ŝin libere sursable kaj ambaŭ rektiĝis

—Do, ĉu vi ne scias kion vi faros? aldonis ŝi persisteme.

—Ha, vi insistas! Ribelulino senkaŭza, kiel tiu malnova filmo de James Dean! Mi volis nur diri "ni vidu poste"— kaj Nemo kisis ŝin surfrunte samkiel oni kisas infaninon.

—Aha! Mia kara viro ne scias ankoraŭ sian destinon post mia foriro. Mi supozas, ke mi devas sin senti flatita de vi. Kompreneble io, kion ĉiu virino sopiras —kaj nun Munja eltiris denove tiun trajton de sarkasmo, kiun ŝi posedis eĉ kiam ŝi malĝojis.— Mi jam povas diveni la tristan destinon de forlasita enamiĝinto, kiu malesperas kaj kantas al sia amatino el la foro, samkiel tradicia trobadoro, kaj kiu kontentigas sin per la dista amado. Sufiĉe!

—Bonege! Vi ŝatas ludi la rolon de cinikulino, sed vi vere ne estas tia virino, kara. Kaj nun jam ni estas parolantaj pri io, kio okazos en tri tagoj, kaj kaŭzos doloron al ni du. Ne ĝenu vin mem, Munja, kun tia anticipio. —Ili ambaŭ stariĝis ĉe la marbordo, dum tiu konversacio ŝajnis daŭrigi malgraŭ kelkaj homoj cirkulantaj en la ĉirkaŭaĵo.

—Venu kun mi, kara, kaj ni eksidu ĉirkaŭ niaj aĵetoj, kie ne estas geinfaĵoj. Nu, ĉiukaze ili ne komprenos nian babiladon. Ne gravas, bonvolu veni.— Li prenis ŝin per la mano kaj ambaŭ marŝis ĝis la loko signita. Munja komencis sin senti embarasita, ĉar ŝuflanke bezonis paroli, sed ŝia vizaĝo tuj turniĝis trista kaj malsekura. Tamen ŝi memoris proverbon de sia lando: "Plej bona gvidilo estas la langa", "ni devas paroli", ŝi pensis, kvankam nenion diris.

Sidinte ambaŭ apud siaj bantukoj kaj dorsosakoj, dum unu minuto ili fiksrigardis unu la alian. Munja donis al li la iniciativon ekparoli pri tiu neagrablebla situacio de disiĝo en la venontaj tagoj, post tia feliĉego en la kariba insulo kaj siaj ĉirkaŭaĵoj. Ŝi sentis tiel afektita, kiam sia menso inundiĝis per tiuj bildoj de forigo, ke la parolo tranĉiĝis, la vizaĝo turniĝis eĉ pli rozkolora ol tiu de la normala sunbanado, kaj iu larmo glitis softe, timema, kaŭzanta al Nemo momenton de kortuŝo. Sufiĉis ja paro da larmoj el ŝi, por ke li tute konfuziĝu kaj perdu sian kutiman sinregon. Tia estis la vera dependon de Nemo.

Li ne dubis, ke li forte kaj pasie amis tiun virinon veninta el norda lando, malgraŭ ĝenaj malfacilaĵoj, kaj ke ilia

rilato navigis nature kaj facile ekde la unuaj momentoj de interkono. Ho! Precize la kontrasto de ambaŭ karakteroj estis gracia kaj stimulant, kaj ĝi donis forton al ilia rilato, ĉar aparte de la impeta allogo de li haŭte kaj sange por la bela korpo de Munja, mense ŝi estis sufiĉe densa, scivolema, kaprica, dominanta, riskema, kaj rapide respondema, kun tamen momentoj, laŭ kiuj ŝi sin montris amikema, dolĉa, solidara kaj komprenema por dolĉigi la vivon de iu ajn viro. Eĉ ŝia maniero kontraŭstari lin per spica ciniko donis amuzon al Nemo. Tiel li imagis ĉi-tempe ŝin, kaj sendube ŝia apero en plenmatura aĝo reprezentis por li la amon perditan en fora tempo, en sia juneco aŭ alidirite la amon ne vivita, ne plenumita de lia adolesko.

Sed nun li kaj ŝi ambaŭ konsciis, ke la nepra disiĝo jam minacis la feliĉegon ĉi-momente. Ĉar la tempo de ferio fuĝas galope, la restaĵo estas serĉi alian okazaĵon de renkontiĝo, kaj tio supozas rekomenci la destinajn vojon, kiu kaprice aŭ senkonscie iun ajn tagon jam decidis kunigi la geparon. Pro tio li enspiris zorgeme kaj komencis selekti taŭgajn vortojn por la serioza momento.

—Kara Munja, karega, tiuj ĉi bluaj okuloj estas la spegulo de miaj anheloj. En ili mi povas trovi mian nedubeblan destinon, mian alvokon al via amo, mian malfermitan horizonton por tiuj ĉiuj jaroj, kiujn mi ne tute vivis antaŭ renkonti vin. —Nun Nemo kliniĝis ĝis intertuŝo frunt-al-frunte de ambaŭ kapoj. Sekve li karesis permane ŝian maldekstran vangon, montrante longan teneron per karesema rigardo, kiu restis en suspenso.

—Jam vi eniris mian vivon, Munja, kaj ekde tiam mia ĝuo estas senti min rigardata de viaj ĉiel-allogaj okuloj. Eĉ mi ne povus rezisti sensufere kiam via vizaĝo malĝojas. Jes tia mia malforto. Tamen nun tempas paroli pri nia disiĝo. Mi devas reveni al mia lando kaj vi al la via. Tio ĉi sonas terure, certe karulino, ĉar oni ne povas subite rompi la pasintecon, malaperi de niaj karaj estuloj, sendube forte ligitaj al niaj koroj. Niaj familioj atendas. Se ni ne turniĝas post tiu ĉi ferio al niaj partikularaj mondetoj, la konscienco ne lasos nin supervivi aŭ subteni plu normalan vivon.

—Nu do, ĉi historio finiĝas kaj ni devas reveni al niaj rutinaj vivoj—ŝi replikis— Mi memoros tiujn ĉi momentojn apud vi, unue intense, senpacience, sed iom post iom la bildo de via bela kaj nun amata vizaĝo turniĝos malklara, senkolora, ĝi perdiĝos laŭ la paso de la tagoj, aŭ eble necesos jaroj de silento, antaŭ ol en mia koro perdiĝu la valoro kaj signifo de tiu ĉi bela frenezaĵo. Ĉu tio estas kion vi volas signifi?

—Bonvolu ne fari la turmenton pli intensan. Mi amas vin, kara, tutforte, kaj ne pensas forlasi vin nek forgesi tiun mirindan travivaĵon kun la bela Munja, kiu jam enestas en mi por ĉiam. Mi ne havas vorton por bone esprimi la mirindaĵon de nia renkontiĝo per la vivo—Ŝi turnis flanken sian hartufon kiel nekonforma gesto antaŭ la viro kaj por kaŝi la vizaĝon.





LA INSULO DE NEMO (VI) Johano Negrete

Venezuela Esperanto-Asocio

Nemo daŭrigis kun sia dekstra mano premante la ŝian— Doloros al mi la disiĝo. Mi volus pasigi la ceteran parto de mia vivo kun vi, tamen ankoraŭ estas neeble konstrui ion por ni. Mi nek vi eliris el niaj hejmoj senrevene plu. Tia malapero, kia absurdaĵo! Ĉu ne? Hej, kara! Nun ni devas kuraĝigi unu al la alia. Ni revenos, sciante, ke niaj vivoj jam ne estos la samaj. Intertempe ni planu nian sekvantan renkontiĝon ĝis la tago en kiu niaj oportunoj alvenos kaj kunigos nin pliforte. Fidu je la Providenco! Ĝi provizas al ĉiu homo sian destinon, kaj jam faris por ni ion grava kiel kruci niajn apartajn vivojn.

Munja estis impresata de liaj vortoj. Ŝia reago estis fiksrigardi lin kun blua flamo en siaj okuloj kaj en movo de alproksimeco kisi lin pasie, enspirante sian propran vivmotivon el lia buŝo. Liaj brakoj etendis por enteni ŝin, senevite ke inter kiso kaj kiso larmoj ŝprucis el ŝiaj okuloj. Per voĉo tremanta kaj malforta Munja parolis:

—Mi multe amas vin, kara mia, mia sinjoro... mia adorebla sinjoro! Mi ne imagas kiel mi povos pasigi la sekvantajn tagojn sen via akompano. Mi scias..., mi devas iri hejmen. Mi ne dubas pri tio, sed mi timas, mi timas miajn proprajn sentojn, kara. Mi ankaŭ revas kunloĝi kun vi senbariere. Mi timas ne kapabli elteni vian ĉeeston. Mi sukcesos tamen, kvankam mi doloros. Iun tagon venos, kiam la suno estos por ni samkiel nia hodiaŭa gvidanto, kaj ni povos maljuniĝi kune promenante tra tiuj ĉi plaĝoj de la amo.

—Ho, Munja, kvanto da beleco mi ĝojas en via akompano! Mi volas iri neniun alian parton de la mondo! Mi volas vin, mi amdeziras vin! Mi akompanos vin ĉiam eĉ se mi ne apudestas. Tiu ĉi plaĝo, ĉielo, tiuj birdoj estas atestantoj de mia promeso. Ni povos kontentiĝi, ke ni jam vojiris kune kaj feliĉis. Vere multaj homoj trapasas la vivon sen koni la veran ampasion, kiel ni jam trapasas. Tamen ni ree troviĝos kune, certe.

Ŝi volis teni ŝin kroĉita al iu kredeblaĵo, ke la fino ne estos tiom proksima, ĉar jam agrable aŭskultis ian muzikon pri eblaj novaj renkontiĝoj. Tio kontentigis ŝin kaj la malĝojo ekmalaperis. Tial ŝi petis febre:

—Amo mia, donu al mi vian vivoforton! Mi bezonas ĝin!

—Nur via forto estas la mia, kara! Mi volus redoni al vi la plezuron, kion mi ricevas de vi. —Kaj li lulis ŝin karesante sian longan malsekan hararon, kiu faris Munja-n aspekti gracie kiel sendefendan knabinon, perdante momente la sintenon de maturaĝa virino kun multe da menfido.

—Ĉu vi amos min ĉiam, okazu kio ajn okazu? — demandis ŝi.

—Ke la ĉielo neniam permesu, ke mi ne amu vin.

—Ĵuru tion per viaj gefiloj! — ŝi petis.

— Mi ĵuras per ili.

—Vi ankaŭ devas ĵuri leviĝante la manon. Ĉu mi prenos vian ĵuron?

—Ne necesas, ke mi estu antaŭ tribunalo

—Nur tiel mi prenos la virparolon kiel puran veraĵon

—Vi do progresas komprenante min, Munja.

—Fakte jes!

—Ej! Ej! Kion vi intencas diri?

—Kion mi diris? —Ŝi replikis petolette.

—Ne faru saman demandon, sed respondu!

—Vi konfuzigas min, karulo.

—Mi ne kredegas tion.

—Kian esperon mi povas havi?

—Espero postulas oferon.

—Ĉu vi parolas pri mi?

—Ne Munja, certe ne. Nur pri mi.

—Plibone. En ĉiu geparo ja la koko povas kanti bele, sed la kokino regas.

—De kie vi lernis tiom da saĝecon, karulino? —li demandis ironie.

—De mia kara patrino, karulo.

—Mi ĵuris kaj vi ne. Almenaŭ via neĵuro povas esti subskribita per longa kiso.

—Kompreneble! Kaj ne nur unu...mi gardas ankoraŭ por vi multe pli da ili. Venu, kara, mi volas mordi vin antaŭ doni kison. Maliculo! Vi multe mankos al mi. Ankoraŭ ni havas du tagojn por ĝui. Intertempe mi ne pensas doni al vi liberon nek paŭzon. Ĉu vi jam aranĝis ĉion por la flugo?

—Jes, kara. Ĉio estas en ordo. Same kiel viaj paperoj. Nun ne serĉu pretekston por via ne bona intenco fini kun mi inter hodiaŭ kaj morgaŭ.

—Mi volas, ke vi havu agrablegan revenon, sed ankaŭ scii vian decidon, kiun mi jam supozas, ke estas la jena: flugi rekte al via hejmo, al via familio, post nia eta kunflugo el nia insulo. Ĉu ne?

—Jes vere. Same kiel vi; vi flugos al via hejmo— Li diris lakone.

La restado en Varadero ŝajnis jam finiĝi. Laŭtaro alproksimiĝis por averti al siaj pasaĝeroj, ke la mateno pasis. Estis la unua horo posttagmeze kaj lia tempo reveni al la insulo de Nemo malfruiĝus. Ili devus tuj starti ĝis la lasta loko: kajeo Pajklana.

(Daŭrigota)







# La misfortuna horo (II-a parto)

Tradukis Ricardo Coutinho

(“La Hora Menguada” de Rómulo Gallegos)

Kun plenita amo kreskis Gustavo Adolfo ĉe la du virinoj kiuj kune gardis lin dolĉsente.

Estis kverelo inter du animoj turmentitaj pro la sekreto, por propigi plene la infanon kiun estas de ambaŭ kaj samtempe nenies.

- Mia filo! Mia fileto!...

Diras Enriketa, kisante multe al li, kaj kun la koro turmentita pro la patrina deziro senpacienca pro la evidenta mensogo.

- Knabo! Knabeto!

Diras Amelia, suferante pro la bedaŭro ĉar ŝi ne povas montri sian patrinan orgojlon rajtigitan per la vero de ŝia amo.

Kaj dum la kreskiĝo de la infano ankaŭ kreskis la senta konflikto kiujn ambaŭ virinoj enhavis en sia animo. Jaluzante kaj rigardante unu al alia: Enriketa ĉiam timas ke Amelia montru la veron iuj ajn tago al infano; Amelia klopodante doni al infano pli da kormoleco ol la fratino.

Pro la konflikto la malamo inter la ambaŭ fratinoj estis pli forta, kelkefoje ili ne parolis inter si dum kelkaj tagoj, ĉiuj fermitaj en siaj dormoĉambroj por ne esti kune kun la alia, kiam ili sidas ĉe la tablo, aŭ dum la nokto, ili kunvenis en la salono kun la infano kiu parolis multe ĝis fali pro dormodeziro en la fotelo, unu al alia rigardis furioze kiel bestoj klopodante scii la penso de la alia. Kelkefoje ambaŭ virinoj havis korsentan impulson kaj en la kapo de la infano tuŝis siajn manojn dume ili faris la kareson, rapide haltis la kormontron kaj iliaj vizaĝoj montris sian malagrablan sintenon pro la okazaĵo, faris ili blekaĵojn kiuj provokis kelkefoje la atencon de la infano.

Malgraŭ la sama forto de la sindono provokis la malagrablan situacion, kelkefoje tiu ĉagreno verŝis ĝiajn bonaĵojn sur la animoj senpacienigitaj de la amo kaj ŝiritaj pro la sekreto. Nur sufiĉas la sprito de la infano por anstauigi la malmolajn buŝojn pro la malamo al la karesaj vizaĝoj; ili rigardis inter si longtempe ĝis la akvumo de iliaj okuloj, kaj konsentinte reciproke bonkoraj kaj liberaj pro la peno, forgesinte la ĵaluzon.

- Mi bedaŭras vian suferon!

- Vi suferas pli ol mi... kaj pro mia kulpo.

Kaj en tiuj momentoj la okuloj de la infano trafis la fulmobrilojn de anĝelo en la rigardo de ili, ĉar ĉiufoje kiam tiu okazas, Gustavo Adolfo ĵuse seriozas kaj rigardas la vizaĝojn de la viroj kun senesprima sinteno.







# LA 6-a AZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Liba Gabalda

De la 19a ĝis la 23a de junio okazis en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio, la 6-a Azia kongreso de Esperanto. La kongresa temo estis “Azia harmoniigo per Esperanto”. Ĝi altiris precipe azianojn, sed partoprenis ĝin ankaŭ kelkdeko da alilkontinentanoj. 24 entuziasmoj alvenis per la Tra-Siberia Fervojo. Entute la eventon ĉeestis pli ol 200 kongresanoj el 27 landoj. Mankis nur afrikanoj. La kongresejo troviĝis en luksa kvinstela hotelo Ĉingis-Ĥano proksima al la urbocentro.

La kongreson organizis KAEM (Komisiono pri Azia E-Movado) kun lokaj esperantistoj. En la kunsido de KAEM estis elektita nova prezidanto. En la malferma ceremonio la kongreson salutis anstataŭanto de la ĉefministro. Oni legis kelkajn salutmesaĝojn kaj poste la membroj de la partoprenantaj landoj salutis la ĉeestantaron.

Multaj interesaj debatoj, seminarioj, prelegoj kaj aliaj altiraj programeroj okazis dum la kongresa semajno: Interkona vespero, fakaj kunsidoj, oratora konkurso, konversaciaj rondoj, aŭkcio, nacia kaj internacia vesperoj. Ni konatiĝis kun mongola historio, arto kaj kulturo, ni provis lerni la mongolan lingvon kaj eksciis pri la Mongola E-movado, pri Esperanto en Unesko. Interesa kaj inspira estis elmonro de kaligrafio de la tuta Azio. Ankaŭ gejunuloj havis sian kunsidon, eĉ sport-amantoj de tablotenis kaj diversaj religiaj grupoj trovis sian lokon tie.

Dum la tuttaga urba ekskurso ni konatiĝis kun vidindaĵoj de Ulanbatoro kaj de supre ni povis vidi tiun pli ol milionhoman metropolon.

Nacia vespero okazis en teatro ekster la kongresejo. Ni spektis tradiciajn dancojn, kantojn kaj akrobataĵojn fare de profesiuloj. Ĝi estis admirinda spektaklo de arta scipovo kaj prezentado. Same belan kaj altkvalitan prezentadon ni povis spekti en la kongresejo plenumita de infangrupo. La internacia vespero estas tradicie dediĉita al talentoj el niaj vicoj. La vespero komenciĝis per parado de ĉiuj kontribuintoj en naciaj kostumoj. Japanoj paradis vestitaj en “jukata” vestaĵoj. Poste oni montris al ni kiel surmeti kimonojn. Prezentiĝis diversaj muzikistoj, japanoj kaj ĉinoj montris ion el sia kulturo kaj ni admire spektis tiun kulturan kalejdoskopon...

La Azia kongreso estis vere impresa kaj fruktodona renkontiĝo. Ĝi liveris al esperantistoj la eblon ĝui eksterordinare belan etoson, formi novajn amikecojn kaj malkovri mirindajn regionojn de la dezerto Gobi dum la turismaj antaŭ- kaj post-kongresaj ofertoj. Malfacilas esprimi en unu paĝo ĉiujn nuancojn de tiu bela evento. Denove pruviĝis, ke Esperanto estas la Internacia lingvo de komprenemo kaj amikeco. Mi certas, ke ekde nun la movado tie plifortiĝos, ĉar la entuziasmo de mongolaj esperantistoj estis grandega. Por multaj el ili la kongreso estis unika sperto.

En la Azia kongreso ni harmonie esperantumis, ĝuis agrablajn eventojn kaj amikajn renkontiĝojn, kio donis al ĉiuj grandan ĝojon kaj entuziasmon daŭrigi poresperantan vojon.





LA 6-a AZIA KONGRESO DE ESPERANTO - Liba Gabalda

Venezuela Esperanto-Asocio



6-a AZIA KONGRESO



ULANBATORO - MONGOLIO



19.6. - 23.6.2010



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda





# MI BEDAŬRAS LA TEMPON PERDITAN SEN ESPERANTO

Johano Negrete

## Dua Parto (1)

### LADUARENKONTIĜO

Kiel jam dirite, la unua hazarda renkontiĝo en la urbo de Toronto (Kanado). La dua alvenis pere de libro, anstataŭ revuo, kaj okazis en Karakaso, en mia propra universitato, trovante ekzempleron hispane de la libro de Pierre Janton: **Esperanto**. Subtitolita: *lingvo, literaturo, movado*. (2) Per tiu ĉi bona libro mi penetris ne nur la strukturon de Esperanto, sen ankaŭ ĝiajn sociajn manifestaciojn, kaj mi memoras, ke mi legis avide ĉi lastajn sociajn ĉapitrojn por akiri kelkajn ideojn pri la internacia lingvo; tiu libro estas verkita laŭ akademika stilo kaj metodo, kiel ĝi estus –mi suspektas- doktoriĝa tezo.

Certe ĝi ne estas lernolibro, sed libro pri esperantologio, kaj kvankam ĝi fidelis al la scienca pritrakto, ankoraŭ mi restis ene de ĝia skriba kodo, ĉar ne povis bone prononci la esperantan alfabeton, ne sciante la tabelon de internaciaj fonetikaj simboloj. Malgraŭ tio, la libro de Janton malkovris al mi novan dimension de la lingvaj problemoj kaj precipe la kampon de planitaj lingvoj, aŭ interlingvistiko, speciale pri la ekzistado de filozofiaj lingvoj, pri kiu mi sciis nenion.

Mi ne povas memori la daton de tiu legado, kaj certe kelkaj jaroj pasis ĝis la forgeso de la unuavide gravaj “skribaj” malkovroj ĉe Janton. Mankis ankoraŭ la kontakto kun esperantistoj aŭ personoj kun faka kono de la lingvo kaj kulturo de la esperanta mondo, kaj mankis ankaŭ la libertempo por atenti novan lingvolernadon. Eĉ ne mankis momentojn, kiam mi inklinis pensi, ke esperantistoj povus konduki kiel alian duonsekretan komunumon, kie oni ne manifestiĝas kiel lingvo-adepto. Ĉu sekreta lingvo kun sekreta celo? La libro de Janton tute klare kontraŭas tion. Kie do estas la parolantoj de la lingvo?

En la akademika jaro 1991-1992 mi estis invitita el la Universitato de La Laguna por fari sciencesploradon pri logiko kaj filozofio kaj mi foriris kun miaj edzino kaj filo al la insulo Tenerifo kaj pli precize al mia naskiĝurbo La Laguna. Ankaŭ mia edzino kiel profesorino estis same invitita al simila esploro-programo pri edukado. Estis jaro eksterordinara por ni tri, ĉar ĝi plenniĝis de akademikaj kaj sociaj eventoj, kun granda ĝojo persone pro reveno al mia urbeto post longjara malĉeesto. Krome en Hispanio dumsomere tiam okazis la monda Expo de Sevilla kaj la internaciaj Olimpiadoj de Barcelono, kaj ni multe ĝuis tiujn eventojn kune kun aliaj vojaĝoj al Portugalio kaj Italio.

### LA TRIARENKONTIĜO

Estis en La Laguna kie okazis la mirakla hazardo trovi esperantistojn. Unu januara tago tute hazarde kaj surstrate mi aŭskultis kvarpersonan konversacion, kaj tuj suspektis, ke ilia lingvo estis Esperanto, kaj tute rekte mi alparolis tiujn virojn demandante: “Ĉu tiu lingvo estas Esperanto?” La respondo: “Jes”. Finfine mi konscie trovis esperantistojn. Tiam leviĝis konversacio kaj ili invitis min viziti la klubon kaj aĉeti lernolibron. Surprize la klubo estis tre proksime de mia loĝejo.

Do la sekvantan dimanĉon mi vizitis la klubon kaj aĉetis materialojn kaj kun la unua lernolibro de Ferenc Szilágyi kaj vortareto de *Sopena* tiun saman nokton mi eklernis la gramatikan resumon en la vortareto kaj entusiasmigis pri la treege simpligita strukturo. Studinte en mia juneco pri la klasikaj latina kaj greka, pri la franca, angla kaj germana, kaj nur pecetojn pri la itala, la araba kaj la kataluna, mi miris nun pri la troa simpleco de la esperanta lingvo, kaj kiel malfermita lernolibro de logiko mi komencis kombini elementojn de la afiksa sistemo kvazaŭ ŝakludo, kiu promesas esti originala kaj kreiva.



**MI BEDAŬRAS LA TEMPON PERDITAN SEN ESPERANTO II - Johano Negrete**

Vere mi neniam klopodis trovi esperantistojn nek rezervi la spacon aŭ tempon por lerni ilian lingvon, kreinte erare, ke tio dependus trovi la taŭgan instruiston, sed ĉi-okaze fronte al mia lernolibro, mi certis, ke Esperanto permesis esti aŭtodidaktike lernita kaj pro tio mi progresis sole. Apartigita de Esperanto, pro mia sencio, pro la tempo kaj cirkonstancojn sen rilato al esperantistaj grupoj, mi nun povas diri, ke mi perdis jarojn sen kontentigi mian fortan bezonon trovi la justan kaj efikan lingvon, kiu donis al mi logikecon, efikecon en la manipulado de radikoj, sendependo de lokaj esprimmanieroj, belsonecon, kaj kreivan kapablon. Nuntempe mi konscias, ke de post kelkaj lingvaj travivaĵoj kaj tempoperdoj, serĉante ne la perfektan, sed almenaŭ la taŭgan nacian lingvon por mi, finfine mi alvenis al Esperanto, kie mi povus min senti "hejme", komforta kaj produktiva, sen ke tio signifis redukti aŭ diskrediti la belecon de naciaj lingvoj, historie konstruitaj.

Sekve mi eniris Esperanton jam de matura aĝo, laŭ mi opinio, malfrue, t.e. ekde 1992, kiam mi estis 50-jara kaj nur unu jaro antaŭ mia emeritiĝo el la universitato. Malfrue, se oni havas la celon flue kaj senerare paroli la lingvon kaj precipe verki. Tio okazis, kiel ni jam konstatis, dum la unujara restado en mia La Laguna, la laborurbo de Juan Régulo Perez, urbo esperantigita de li per sia eldonejo Stafeto. Mi komencis la memlernadon ekzakte la 22-an de februaro de 1992, nokto kiu tute ŝanĝis mian vivon, ĉar ĝi afektis mian universitan esploradon pro mia dediĉego al lingvolernado kun neglekto de miaj akademikaj devoj en La Laguna.

Tri monatoj poste mi devis halti la lingvon pro kialoj de pluraj familiaj vojaĝoj, sed ĝin reprenis en oktobro de 1992, estante jam en Venezuelo. Poste daŭrigis sole la lernadon samtempe kun mia instruado en la karakasa universitato antaŭ ol kontakti la venezuelan esperantistaron. La intenco estis plibonigi mian kapablon sin esprimi kaj konversacii esperante kun la tiea esperantistaro, kaj ĝuste en februaro

1993 mi mem prezentiĝis al la karakasa klubo. De tiam eklernis kun ili pere de perfektiga kurso. Sendube Esperanto estas lingvo, kiun oni povas lerni aŭtodidakte kaj en ajna aĝo, kvankam samkiel ĉiu lingvo oni nepre kaj avide bezonas la interparolanton.

Kiel multaj homoj mi kuriozis pri Esperanto, sed neniam trovis personojn aŭ okazaĵon por ĝia lernado. Mi malkovris kaj lernis Esperanton, kaŭze de ke jam havis la dispozicion aŭ tendencan serĉi ĝin. Hermann Hesse asertis iom ŝajna, ke nur konscias pri io ajn tiuj, kiuj iumaniere jam havas la dispozicion ĝis tio. Efektive, miaj unua renkontiĝo kun Esperanto en Toronto kaj la dua en Karakaso per la libro de Janton jam preparis la vojon, la dispozicion al la internacia lingvo. Intelektua evoluo laŭ miaj propraj tendencoj duon-aŭ-tutkonscie. Esperanto donis al mi alian dimension, alian kuraĝon, ĉar kaŭze de mia tiama aĝo (50), mi ne aŭdacus komenci alian fremdan lingvon, se ĝi ne estus Esperanto pro ĝia reguleco kaj parolebleco.

Do mi kredas, ke Esperanto utilas al ĉiuj personoj, kaj estas lernebla ne gravas kiom ajn estu la aĝo de la lernanto. Krome, se oni jam pasis al la tria aĝo, mi firme estas konvinkita, ke la internacia lingvo estas granda kaj vigliga okupado tiuaĝe, kaj povas doni feliĉon al la maljunuloj. Pro tio oni neniam devas forlasi la ideon de la esperanta universitato por la tria aĝo. LERNU, LERNU ESPERANTON, NE GRAVAS LA AĜON.!, au kiel diras la poeto: «Ne atendu –ĉiu minuteto/ de mallonga vivo flugas for –/ Lernu kun malmulta laboreto/ lingvon, kiun amos via kor'!» (K. Svanbom)

**Rimarkoj**

1. la unua parto de tiu artikolo aperis en la 84<sup>a</sup> eldono de nia revuo, kaj aperas en la retpaĝo [www.esperanto-amikaro.org.ve](http://www.esperanto-amikaro.org.ve)
2. **El Esperanto**, oikos-tau s. a.–ediciono; Barcelona, España, 1976







# La 27-a INTERNACIA FESTIVALO EN NÖRDLINGEN

Liba Gabalda

27.12.2010 - 3.1.2011  
Kadra temo: LINGVOJ

Denove post unu jaro ni renkontiĝis en la bela bavara urbo Nördlingen por festi la 27-an IF. La urbo bonvenigis nin impresige blanke vestita. Pro rigora malvarma kaj neĝa vetero trajnoj malfruis kaŭzante al multaj partoprenantoj problemojn. Al la aranĝo aliĝis 111 personoj el 17 landoj, sed ne ĉiuj povis veni. Tamen la festivalo estis tre sukcesa. Belkolora IF-broŝuro konatigis nin kun la semajna programo. Ni ĝuis altkvalitajn prelegojn kaj vesperajn kulturajn prezentaĵojn. Pluraj prelegoj traktis la kadran temon pri lingvoj; ni povis konatiĝi kun la hebrea, armena, nederlanda, luksemburga, dana, rusa kaj ankaŭ kun lernigaj teknikoj por lingvoj. Tacuo Huĝimoto el Japanio klarigis pri idiolekto, dialekto kaj idiomo. Krome oni povis sperti gestan lingvon kaj lingvon de fabeloj. En la mondo ekzistas miloj da lingvoj, sed nia Esperanto estas la plej facila kaj belsona, Ni praktikadis ĝin ĉiutage en gaja, agrabla kaj amika etoso.

Estis okazo promeni en la urbo, rondiri la urban muregon, viziti preĝejan turon kaj lokan muzeon. Plurfoje ni povis sekvi vojaĝprelegojn kun allogaj bildoj: tra Rusio al Mongolio per transsiberia trajno, pri Kubo, Brazilo kaj Bona Espero, Maroko de la nordafrika Atlaso ĝis Saharo, ĝui bildfabelojn kaj aŭskulti operojn.

Aparte interesaj prelegoj temis pri: kosmo kaj meteorŝtonoj, pri longitudo, pri reta esperanta proverbaro, pri vintraj sportoj, pri efiko de korea ginsengo kaj kuracado laŭ metodo de pastro Kneipp, pri Aleksandro Dumas kaj Antoine Galland kaj aliaj. Pri perkomputila foto-prilaborado konatigis nin Rémy, kiu mem sukcese spertiĝas en tiu-ĉi

ŝatokupo. Per mandalismo ni provis trovi solvojn pri la estonteco de IF. Tuj naskiĝadis ideoj kaj proponoj por plibonigoj... Filmo pri la pasintjara IF refreŝigis memoron pri la antaŭa aranĝo.

Okazis la 4a IVU, skribaj E-ekzamenoj laŭ la normoj de la Eŭropa Referenckadro, funkciis libroservo. "Posidelki" kun Ljuba el Rusio donis okazon agrable babili ĉe teotrinkado kaj gustumi kelkajn bongustaĵojn el Rusio. Siajn novajn librojn prezentis dum aŭtora horo Mikaelo Bronŝtejn. Matene okazis gimnastiko, posttagmeze jogo, plurfoje eblis ĝui saŭnon. Mi, inspirita de vojaĝado en Kubo, invitis dancŝatantojn al afrokuba dancvespero. Interkonan, distran kaj internacian vesperojn gvidis Mikaelo Bronŝtejn, dagestanan vesperon Aĥman Junusov. Josi Ŝemer preparis interesan kvizon. Nia magiisto Triksini amuzis nin per novaj trukoj. Ĉiuvespere ni kunĝuis restadon en nia ŝatata "Knajpo".

La 30-a de decembro ni tradicie ekskursas. Ĉi-foje ni vizitis la bavaran ĉefurbon - Munkeno. Tie ni tagmanĝis en barelforma restoracio kaj iom promenis en la urbo. Sed la plej interesa kaj atendata parto de la semajno estas la silvestra nokto kun abunda bufedo, balo inaŭgurita per polonezo kaj speciale festa etoso dum bonvenigo de pluraj Novjaroj laŭ la diversaj horzonoj de la ĉeestantaj partoprenantoj. Do, brakumado, tostado kaj kisoj tiuvespere abundas.

Korajn dankojn kaj gratulojn al nia ĉeforganizanto Hans-Dieter Platz (HDP), kiu sukcese dum pluraj jaroj aranĝas por ni neforgeseblan semajnon kaj zorgas pri ĝia bona disvolviĝo. Jarfine ni renkontiĝos en la 28a IF, ĉi-foje en Xanten. Bonvenon al vi ĉiuj!





# La 27-a INTERNACIA FESTIVALO EN NÖRDLINGEN



Nördlingen



27a INTERNACIA FESTIVALO



27.12.2010 - 3.1.2011



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda







# Kio eblas en Esperanto? Aŭ laŭ Ken Miner: Esperanto, la svaga lingvo! Ramo Moraloj-Kastelo

Paperlingvisto unua: "Ĉu vi legis mian artikolon LA NEKEZISTO DE UNT-PARTICIPOJ KIEL PRUVO PRI LA NEEBLECO DE ESPERANTO ESPRIMI REALAJN KAJ UTILAJN HOMAJN IDEOJN?"

Paperlingvisto dua: "Pardomu min, sed mi ne komprenas vin! Mi ne scias ekzakte kion vi signifigas pere de la vorto *artikolo*. Ĉu vi signifigas ĝin determinilo aŭ ĉu teksta verketo aŭ ĉu speco de varo? Damne! Esperanto estas tiel svaga lingvo!" (1)

Jen maniero pere de kiu lingvisto ia celas pleniĝi la bildon de Esperanto je malagrablaj interpretoj: uzante la korpuson de la internacia lingvo (la **Tekstaro de Esperanto**) kiel priarmean korpuson por certigi, ke 1) ne eblas ia priesperanta lingvoscienco kaj, ke 2) la manko de denaskaj parolantoj nebligas scii kion ne estas eble en la esperanta lingvo... Tio ĉi antaŭe (1 kaj 2) por konkludi ruzece tion: *Esperanto estas svaga lingvo, Esperanto ne estas vera lingvo, kiel la aliaj; negativa evidento por lingvosciencia esplorado mankas en Esperanto, sekve... ktp...*

Mi ĉiam malkovras la manieron tiun, per kiu "sciencisto" (tiel, intercitile) profitas la malfacilajn ideojn kaj lingvaĵojn de sia fako por leĝigi la proprajn komprenmistrafojn anstataŭ utiligi la propran klarecon por esplori honeste kaj vere science la nekonatajn fenomenojn (ĉu ne estas tiu ĉi la celo de la sciencistoj?). Tian malkovron mi jam spertis pri astrologio. Kvankam ne ekzistas vere sciencaj esploroj pri la priskribkapablo de la stelscienco aŭ kvankam la sciencaj verkoj tiurilate publikigitaj estas plenaj je misaj antaŭjuĝoj kaj komprenmistrafoj pri la astrologia teorio, "sciencistoj" kaj "sciencemaj homoj" (tiel, intercitile) insistas aserti, ke astrologio estas ŝajnscienco. Anstataŭ profiti el la scienca klareco por skribi vere sciencajn esplorojn pri astrologio (verkoj tiuj, kiuj estas nepre bezonataj), tiuj personoj preferas skribi ruze pri kiel fiaske la stelsciencistoj agas...

Do, ĉu **Esperantujo** ne havas kompletan parolkomunumon? Ni bone scias, ke ni ne eliras straten el niaj domoj por paroli esperante kun la busŝoforo aŭ peti helpon krie en Esperanto, kiam iu ŝtelisto ŝtelas en ia stratangulo. Eble por maljunaj homoj la ununura oportuno paroli esperante estis partopreni en **Universalaj Kongresoj** aŭ aniĝi al **E-Asocio** aŭ **E-Klubo**. Science parolante, tio ĉi jam estas ia parolkomunumo. Kaj ĝi ekzistas jam antaŭe de la jaro 1905! Tamen, ne parolante pri la estinteco sed pri la estanteco, nia parolkomunumo bone kreskiĝis. Danke de Interreto kaj de la telefono, la esperantoparolantoj povas interkomunikiĝi tiel vigle, ke ni jam parolas pri specifaj akĉentoj kaj parolturnoj. Ni jam bone rekonas, kiel slavdevenaj esperantoparolantoj vibrigas forte konsonanton ro. Ni jam bone rekonas la akĉenton de brazilujanoj aŭ de francujanoj aŭ de angleparolantoj esperantistoj. Ni jam komentas pere de Facebook kiel azianoj emas meti la objekton komence de la frazo, dum okcidentanoj faras la malon. Ni jam havas decajn kantojn pri kiuj maljunaj esperantistoj (kaj ankaŭ kelkaj junaj) sentas sin fieraj kaj suprenigitaj kaj samtempe la junuloj jam havas maldecajn muzikaĵojn (ekzemple, "Fek al Esperanto"), per kiuj la nunaj geknaboj lernas multajn fivortojn kaj aliajn "modernajn" junecaĵojn...

La antaŭo okazas same en la etnaj lingvoj. Ĉu elmontriĝo de ia parolkomunumo ne estas la antaŭo? Ĉio tio

ĉi, kion mi skribis en la supra paragrafo okazas en Ameriko pri la hispana kaj pri la angla! La malsameco estas, ke nek la angla nek la hispana estas planlingvoj: ili ne havas apenaŭ pli ol cent dudek jaroj da publika aĝo, ili ne havas **Universalajn Kongresojn**, ili ne havas **Fundamenton** kaj **Zamenhofon**. Ili ne maturiĝis en jarcento tiel, kiel iĝis Esperanto. Sed ni ja havas parolkomunumo! Ne akceptu uzon de lingvoscienco por nei tiun ĉi fakton! Nia parolkomunumo ne estas "kompleta": jen temo lingvosciencie esplorinda. Nia parolkomunumo ne funkcias tiel, kiel la aliaj: jen temo lingvosciencie esplorinda. Ni havas manpleneton da denaskaj parolantoj: jen temo lingvosciencie esplorinda.

Jen aserto tia, skribita de homo tiu, kiu nomas sin mem "lingvosciencisto"... Jen aserto ŝajnsciencia: "...kvankam ni povas scii, kio eblas en la esperanta lingvo, ni ne povas scii, kio *ne* eblas." Tio devenas de la artikoleto de Ken Miner, "TRANĈITAJ FRAZOJ KAJ LA PROBLEMO PRI NEGATIVA EVIDENTO"...

Unue mi nur povas diri, ke preskaŭ ĉio eblas en modernaj lingvoj. Sed, ĉu ebleco tie ĉi signifas "gramatikajn frazojn"? La vera lingvosciencia demando ne estas "kio eblas", sed "kio taŭgas". La fifama regno de la barbarismoj, de la idiotismoj, de la mise gramatikaj frazoj kaj de la negramatikaj frazoj, estas senlima. Preskaŭ ĉio eblas en evoluita lingvo kaj granda peco de tiu ĉi eblaro apartenas al la antaŭe menciita fifama regno. Lingvistoj ne devas fari moralajn komentojn pri tiuj fenomenoj, ĉar moralaj aŭ filozofiaj demandoj ne estas la ĉefa tasko de lingvoscienco. Do, la vere scienca problemo ne estas kio eblas en lingvo, sed kio taŭgas kiel komunikmaniero, por esprimmaniero. Tiuj formoj aŭ frazoj, kiuj taŭgas pli por komuniki ion, estas pli trafaj kaj pli gravaj ol tiuj, kiuj ja eblas sed komunikante nenion aŭ komunikante malfacile ion.

Ken Miner uzas ekzemplaron de *tranĉitaj frazoj* por "demonstri", ke "kvankam ni scias, kiaj ekzemploj *eblas* (ni simple trovas ilin en tekstoj), ni ne scias, kiaj ekzemploj *ne eblas*." Kion volas sprimi la lingvisto? Nu! Ni pripensu... Jen ebla frazo en Esperanto:

"En (1), ĉu la laboranto lavis unuopan objekton, aŭ substancecan aferon? Ni ne scias. Se parolanto efektive uzus (1), ŝli certe havus signifon en sia menso. Sed pro trajto de la lingvo mem, ŝli ne povus komuniki tiun intencatan signifon nur per (1). Ŝli devus esprimi sin alimaniere, eble per (2)... " (Ken Miner. *KION SIGNIFAS "AĴO"?* *KONVERĜO DE DUMORFEMOJ*)

Legante tiun pecon da teksto, ni trovas vorton tiun, kiu ne estas "fundamenta". Tio estas, vorto kiu ne apartenas al la normala formo de la lingvo Esperanto: la vorto **ŝli**. Vi legas la tekston kaj demandas al vi mem: "kio diable estas **ŝli**?" Eble, se vi ne havas ĝisfundajn sciojn pri gramatiko aŭ lingvoscienco, vi ne povos ekspliki en nia faklingvaĵo kion





## Kio eblas en Esperanto? Aŭ laŭ Ken Miner: Esperanto, la svaga lingvo! Ramo Moraloj-Kastelo

tiu ĉi vorto signifas. Sed certe vi scios, ke ĝi temas pri *parolanto* (“**Se parolanto efektive uzus... ŝli...**”), kaj ankaŭ vi certe scios, ke ĝi temas pri *persono* (“**ŝli certe havus signifon en sia menso**”). Pro uzo de la vorto *parolanto*, la skribinto de la paragrafo sciigis nin, ke **ŝli** estas iel pronomo de la tria gramatika persono (li, ŝi, ĝi). Pro tio, ke ni scipovas nian lingvon (*kiu estas certe tute ne svaga*), ni komprenos tuj la eblan signifon de **ŝli**: ĝi signifas iamaniere la kunecon de la pronomo ŝi kun la pronomo li.

Mi skribus la frazon tiel: “Se parolanto efektive uzus (1), ŝi/li certe havus signifon en sia menso...” Ĉar la pronomo **ŝli** ne “ekzistas” en nia lingvo. Mi metas la verbon inter citiloj pro tio, ke ni komprenas bone la malkonvenon de nescienca distingo inter “ekzisto” kaj “neekzisto” de vorto... aŭ “ebleco” kaj “nebleco” de frazo. Ken Miner uzis la “neekzistantan” pronomon **ŝli** kaj ni tute povis kompreni lian tekston. Kial tio ĉi eblis? Tio ĉi eblis kaŭze de: 1) la vorto **ŝli** havas ian akordecon kun la logiko de nia lingvo (**jen la interdependeco de gramatikeco kaj logikeco! Interdependeco tia, ke Ken Miner mem neadas...**) 2) ĝi estas vorto ne nur ebla sed ankaŭ taŭga por komuniki certan ideon (la ideojn de ŝi kaj li kunigitaj!).

Nun, mi ne proponas doni premion al Ken Miner pro uzo de la bastarda pronomo **ŝli**. Mi proponas doni al li malpremon pro profiti ĝisoste la mirindajn trajtojn de nia genia lingvo kaj samtempe aserti, ke nia lingvo estas neprecisa, *svaga*, aŭ ke ni ne povas scii kion ne eblas en ĝi! Jen vere lingvosciencia aserto: la problemo ne estas kiel eblas en Esperanto la vorto **ŝli** sed KIAL ĝi estas taŭga por komuniki ideojn? Ken Miner asertas en sia ŝajnsciencia artikoleto la jenon: “**Sed ne eblas ke la emfaza elemento estu adjektivo, nek predikata substantivo:**

“(18) \*Estas bonkora, ke li ŝajnas.

(19) \*Estas advokato, ke li estas.”

Tiuj frazoj ja eblas en Esperanto tiel, kiel la jenaj frazoj eblas en la hispana:

*Es de buen corazón que él parece.*

*Es un abogado que él es.*

Ne gravas, ke la esperanta estu planlingvo kaj la hispana aŭ la angla ne. Tio, kio gravas, estas la lingva taŭgeco de ebla frazo kaj ties trafeco por komuniki ion. La kvar antaŭaj frazoj ja estas eblaj, sed ili ne taŭgas por komuniki ion, ĉar la signifo perdiĝas pro la nenormala aranĝo de la frazelementoj kaj pro la uzo de la multuza kunigilo ke. Ni ne bezonas esperantajn denaskajn parolantojn por diri al ni kial (18) kaj (19) ne taŭgas. Se ni demandus al denaska parolanto de la esperanto lingvo, ĉu tiaj frazoj eblas aŭ ne eblas, “**ŝli**” eble ridos kaj diros:

*Ili ja eblas, sed tio ne estas la problemo. La problemo estas, ke se vi scipovas Esperanton, estante denaska parolanto aŭ ne, tiam vi diras: “Li ŝajnas esti bonkora” kaj “Li estas advokato”, ĉar kial ni parolu kiel simiuloj anstataŭ uzi la pli taŭgajn manierojn esprimi ion?...*

Do, se ni kiel parolkomunumo volas havi denaskajn parolantojn, ni laboru celante tion. Sed ni laboru *honeste*. Mi certe ne kredas, ke la argumentoj de Ken Miner celas

substreki la bezonon pri denaska esperanta parolkomunumo homamasa (kio estus diable bone!). Ŝajnas, ke li nur volas kritiki nian lingvon. Estigante falsajojn pri nia lingvo, ŝajnsciencajn esplorojn pri problemoj, kiuj ne estas tiel, ni atingos nenian bonon.

“**Esperanto ne havas denaskajn parolantojn, al kiuj demandi. Eĉ se ni disponus pri centoble pli granda Tekstaro, ni ankoraŭ ne scius, kio NE eblas. Ĉar neeblaj frazoj ne okazas en korpusoj.**”

Neilustrita homo nur respondus tiel: “Neeblaj frazoj ne okazas en korpuso ĉar neeblaj frazoj okazas nenie! Eĉ ne en lingva komunumo etna!” Sed, ĉu vere? Mi ĉiam memoras anekdoton pri kiu unu latinamerikanino vojaĝis al Hispanujo kaj tie ŝi diris: “Me voy **ahorita**” (“Mi foriras **nunete**”). Iu hispanujano ridis kaj diris: “¿Pero qué has dicho? ¡Esa palabra no existe! No es posible decir eso en español!” (“Sed kion vi diras? Tia vorto ne ekzistas! Ne eblas diri tion hispane!”) Jen du personoj, ambaŭ denaskaj parolantoj de la sama etna lingvo, sed unu estas parolantino de la hispana lingvo amerika kaj la alia estas virparolanto de la hispana lingvo hispanuja. Kaj unu el ili asertas, ke tion, kion la alia diris, *ne eblas en la hispana*. **SED TAMEN MILIONOJ DA LATINAMERIKANOJ UZAS ĈIUTAGE LA VORTON “AHORITA” (“NUNETE”).** Do, tia vorto ja eblas, ja ekzistas. Ĝi estas ne nur tute logika sed ankaŭ taŭga por komuniki certan ideon. Sekve, ĉu la argumento pri la nepreco de “negativa evidento” (certe plej negativa fojfoje!) de denaskaj parolantoj ne malaperas neniĝe en rubujon?

Kaj jen denove en la menciita artikolo ni trovas la fian ŝajnsciencan aserton de Ken Miner: *pri Esperanto eblas nur esperantologio sed ne lingvistiko...* aserto tiu, kiu kaŝas la malŝaton de lingvisto, kiu ŝajne deziras lingvosciencie demonstri, ke Esperanto estas lingvo nur *iuse*... Nu! Esperanto estas lingvo ĉiasence! Kaj ĝi estas tiel preciza, ke ĝi ebligas al homo tiu, kiun Ken Miner, verki pri lingvoscienco kaj uzi spritplenan elpensadon kiel la pronomon **ŝli**! Esperanto estas tiel preciza lingvo, tiel ebla je nuancopleneco, ke ni povus ankoraŭ havi kvar pronomojn de la tria gramatika persono (li, ŝi, ĝi, **ŝli**)... *Jes! Kiel svaga estas la esperanta lingvo! Vere svaga lingvo...*

En Esperanto, ĉio eblas, kion “havas sencon”. Certe jes, sed ankaŭ eblas tion, kion ne havas sencon, ekzemple unt-participoj (ili estas sendube aĉaj barbarismoj). Scipovantoj de Esperanto bone komprenas tion. Sed tia vero tuŝas ĉiujn lingvojn, jen planitan lingvon kiel Esperanton, jen etnajn lingvojn. Veraj lingvosciencistoj komprenas tion! La lingvosciencia demando ne estu nur pri *ebleco* kaj pri ia manko de denaska parolkomunumo *kvazaŭ niaj fundamentaj tekstoj ne estus fiksiloj de emo al grundo de certeca praveco gramatika...* Se mi diras al vera lingvosciencisto, “Jen via defio! Ne ignoru ĝin!”, tion ĉi **ŝli** vere komprenus.



Noto: (1) Paperlingviston mi nomas al lingvisto tiu, kiu tre bone konas la lingvosciencajn teoriojn sed ne havanta freŝan realan kontakton kun la parolantoj de la lingvo, kaj sekve nescianta la pragmatikaĵojn de lingvoj (ironie, Ken Miner estas fakulo pri pragmatika lingvoscienco). Lingvisto nur en la paperoj (la libroj, la revuoj, la fakulaj rondoj kaj disputoj, ktp).





## DEBUTAS NOVAJ E-FILMETOJ



Filmero de la filmeto Ĉapeloj.

FORT COLLINS, KOLORADIO, USONO

Post jarlonga studado kaj laborego, Simono KEITH sukcesis diplomiĝi pri klasika animacio ĉe la vankuvera filma stud-ejo (Vancouver Film School) en Brita Kolumbio, Kanado. Post intensa eduko pri la principoj kaj fundamentoj de animacio, li dediĉis pli ol kvar monatojn al kreado de filmo tradicie desegnita sur papero. La rezulto estas Ĉapeloj, la unua animacia filmo en Esperanto. Li tuj poste kreis plian filmon, Neĝuloj, en nur kelkaj semajnoj uzante komputilajn ilojn.

Ambaŭ filmoj debutis ĉe lia diplomiĝa ceremonio, la 17-an de decembro, 2010. Proksimume dek esperantistoj venis por spekti. La 10-an de februaro, Ĉapeloj gajnis premion en loka filmkonkurso en Fort Collins.

Pliaj informoj baldaŭ aperos inter la paĝoj de Kontakto, numero 241 (2011:1). Tie eblos legi detalan intervjuon kun Simono, lukse ilustritan per skizoj, bildoj, kaj fotoj.